Section 1.—The organization of Rondoj is hereby authorized in every and all parts of the State of California. Each Rondo shall consist of not less than FIVE (5) persons, who must be members of the Esperanto Association of North America, or who shall pay the E. A. N. A. membership fee of fifty cents annually into the Treasury of the Kalifornia Esperantista Rondaro.

Section 2.—A charter shall be granted to a Rondo of not less than five (5) members upon payment of a fee of fifty cents and after a copy of the Constitution, By-Laws, Rules or Regulations of said proposed Rondo has been presented to, and approved by the Rondaro. No organization shall be recognized as an affiliated body of the Rondaro until the above

conditions have been complied with.

Article VI—Dues:

The dues of the Rondaro shall be fifty cents per year. Twenty-five cents of this amount shall go to the Esperanto Association of North America, and twenty-five cents shall go into the Treasury of the Rondaro.

Each Rondo shall have power to impose whatever fee it deems fit.

Article VII—Amendments:

This Constitution may be amended at any meeting by two-thirds vote of the Directors present, provided notice of said amendment shall have been given in writing to each Director two weeks prior to said meeting.

NINTH E. A. N. A. CONGRESS

It is by no means too early to begin thinking of the 1916 meeting of the Association. This has been assigned to Annapolis, Md., one of the most charming and delightful little cities on the Atlantic seaboard. In close proximity to the national capital, visitors will be afforded exceptional opportunities for a pleasant and profitable vacation.

To take care of all business and social events connected with the Congress, four days will be allowed, giving ample time for even the most hurried and busiest in our midst to make a few short side trips to places of interest.

July 27-30, inclusive, have been agreed upon as the most suitable time, and the weather man's co-operation is guaranteed. We are promised the use of the State House for all

Executive Sessions, and Sunday services in Esperanto will be a feature of the convention. Rev. James L. Smiley, Councilor for the Capitol Division, assures us of a hearty welcome by the local Esperantists, who will take upon themselves all arrangements for the comfort and pleasure of visiting samideanoj.

Seriously considering this, you have a solution to your vacation problem which is no doubt bothering you already. Every year our annual meeting strives to increase the fellowship, the amount of work accomplished and the spirit of Esperantism among the members in North America. We have yet to be unsuccessful in these objects. 1916 will be no exception to this statement. **Think** the "Annapolis Congress"—**talk** the "Annapolis Congress." **Begin NOW.**

La bona eta Arturo sidis sur la persono mallaŭte ploranta.

"Kio estas al vi, mia knabeto?" demandis bonkora sinjorino pasante.

"Panjo ĵus dronigis ĉiujn el la katidoj."

"Ho, kiel domaĝe! Mi bedaŭras tion."

"Kaj ŝi promesis ke—ke mi povos—dronigi ilin!" Trad. Ho Ho

"Nu, Beatrico, ĉu vi estis tre brava ĉe la oficejo dentista?"

"Jes, onklino, mi estis."

"Tiam, jen estas la duondolaro kion mi promesis al vi. Nun, diru al mi kion li faris."

"Li eltiris el Vilĉjo du el liaj dentoj."

—F.H.B.

LA FANTOMO EBRIA DE ARLO BATES, LITT. D.

Tradukis Herbert Harris, laŭ Permeso

Ricevis honoran mencion en la Literatura Konkurso de la 11a Kongreso

I

Ne estis ŝia beleco, kiu faris Ireno'n Gaspik neordinara, kvankam rave beleca ŝi estis; nek estis ŝia spriteco, ŝia lerteco, ŝia riĉeco, malgraŭ tio, ke ŝi plene posedis ĉi tiujn bonaĵojn; aliaj junulinoj estis belaj kaj spritaj, lertaj kaj riĉaj. Estis io multe pli subtila kaj eksterordinara, kio montris ŝin malsimila al ŝiaj kunuloj. La vero estas ke, de sia patrina praonklino (maljunulino kiu, dum preskaŭ naŭdek jaroj, elmontris al siaj kunhomoj plejeble strangan karakteron), Ireno heredis povon vidi fantomojn.

Oni kutime opinias, ke eĉ **kredo** pri senkorpaj animoj estas sensencaĵo; sed senkulpigas Irenon la fakto, ke ŝi kredis pri ili nur ĉar ŝi ne povis ne vidi ilin, kaj la kroma fakto, ke la povo, kiun ŝi posedis, alvenis kiel heredaĵo al ŝi, tute ekster ŝia volo. Ĉiu justulo certe povas ek senti la diferencon inter persono, kiu vidas aperaĵojn, ĉar li malsaĝe kredas pri ili, kaj persono, kiu kredas pri ilia ekzistado, ĉar li nepre vidas ilin. Oni povas ankaŭ aldoni, ke la kuraĝo, kiun montris Fraŭlino Gaspik, vizitate de kelkaj el la plej malagrablaj fantomoj en la tuta kategorio, atestas, ke ŝi ne estas ordinarulo.

Dum vizito ĉe la Kastelo Doddyfoethghw—kie troviĝas la plej terura fantomo en tuta Britujo, kiel scias ĉiu vojaĝanto en Kimrujo—aliris al ŝi sangeganta figuro, portante sian vunditan kapon en la manoj, sed ŝi nur diris trankvile: "Tuj foriru, mi petas. Vi tute ne timigas min; sed estas tre maldece ke vi alproksimiĝas al sinjorino, estante en tiel abomeninda stato." Je tio, la kompatinda fantomo, pro timo kaj mirego, falis

dissternita sur la ŝtona planko, farante sangan makulegon, kiu ekzistas ĝis la nuna tempo; kiel ĉiu povas vidi, kiu estas sufiĉe dubema por iri al la Kastelo Doddyfoethghw kaj ĝin serĉi.

Kvankam Ireno malofte aludis al sia heredita povo, kaj, kiam ajn ŝi priparolis ĝin, ŝajnigis indigni ĉar la onklino Eŭnico Mariamno trudis al ŝi tian heredaĵon, tamen ŝi estis tro funde homeca kaj virina por ne senti iom da sekreta fiereco tial, ke ŝi distingiĝis pro tiel neordinara kapablo. Kompreneble ŝi neniam malkaŝe priparolis tion, sed ŝi ne havis sufiĉe da firmeco por tute kaŝi ĝin; kaj preskaŭ ĉiuj ŝiaj geamikoj sciis pri la heredaĵo, kaj pri multe da rezultantaj cirkonstancoj. Kelkaj intimuloj eĉ kuraĝis peti ŝian helpon por komunikado kun familiaj fantomoj; kaj, kvankam Ireno ne tute ĝuis tion, ĉar ĝi tro similis al mediumaj kaj aliaj iom trivialaj okupiĝoj, tamen ŝi nepre sentis plezuron pro la rezultatoj kiuj sekvis ŝiajn servojn je kelkaj okazoj.

Tial, kiam ŝi ricevis de sia antaŭa kunlernantino, Franjo McHugh(1), letereton petantan, ke ŝi vizitu ŝin ĉe Malnovturo, la McHugha bieno, kaj enhavantan la jenan misteran diron:— "Mi ne nur sopire deziras vidi vin, karulino, sed estas io plej grava, kion vi kaj neniu krom vi povos fari por mi," Ireno tuj rememoris, ke ekzistas familia fantomo ĉe la McHugha hejmo, kaj ŝi sentis sin certa, ke ŝi estas invitita por kvazaŭprofesia servo.

Malgraŭ tio, ŝi tute ne volis eviti la viziton, pro jenaj kialoj: la McHugha posedaĵo estas beleca prapatra bieno, lokita en unu el la plej ĉarmaj vilaĝoj en Novanglujo, kie la familio kvazaŭe

regadis de tre malnova tempo; cetere Ireo sufiĉe amis Franjon kaj krom tio, per tiu scipovo, kiu ebligas ke multaj virinoj scias pri tre multe da aferoj ŝi bone sciis ke Arturo McHugh, la frato de ŝia amikino, estos hejme je la tempo de ŝia vizito. Ireo kaj la Leŭtenanto McHugh antaŭe estis tiel amikemaj, ke ili preskaŭ atingis formalan fianĉigon; sed, je la lasta momento, li sin reprenis. Ne ekzistis ia dubo pri lia amo, sed li tute ne povis peti, ke ŝi kunhavu kun li liajn posedaĵojn, pro la subita rememoro, ke li posedis nenion. La familiaj riĉaĵoj, antaŭe princaj, laŭ la tempo kaj regiono, jam tiom malgrandiĝis, ke restis tre malmulto, krom la prapatra domo kaj la belaj sed malprofitaj herbejoj, kiuj ĝin ĉirkaŭis.

Kompreneble tia konduto de la Leŭtenanto McHugh plej firme fiksas lin en la koro de Ireo. Oni kutime ne forgesas tiun amanton, kiu daŭre amas, sed senegoisme rezignas la amatinon; kaj oni povas supozi ke, kiam Fraŭlino Gaspik akceptis la inviton por vizito ĉe Malnovturo, la bela, juna leŭtenanto, viva kaj reala, trovis pli grandan lokon en ŝiaj pensoj, ol la antikva senkorpa majoro, kiu kaŝe okupadis la misteran ĉambro.

II

Malnovturo staras en bela kampa vilaĝo, forlasita de la nuntempa vojaĝado, kiu sin turnas for de la malnova ŝoseo kaj iras sur la pli rekta fervojo. La bieno etendiĝas iom grandan distancon laŭlonge de la rivero, kiu serpentumante tiel tordas sin, ke la vilaĝo preskaŭ fariĝas insulo; kaj sur altaĵeto, kiu staras apud la riverbordo, nun dispecetiĝas falinta amaso da ŝtonoj, kiu iam estis gardoturo, de kiu la bieno ricevas sian nomon.

La domo estas plej impona, antikva loĝejo, kaj staras bele lokita sur teraso, iom super la nivelo de vasta

ĉirkaŭanta herbejo. Malantaŭ la domo, kaj etendiĝanta al la rivero, kuŝas bonorda ĝardeno, havanta buk-sajn branĉobarilojn, kiuj kreskas ĝis la genuoj de la ĝardenisto; kaj en la antaŭaĵo, alta kreskajbarilo apartigas la bienon for de la vilaĝa strato. Fraŭlino McHugh, kiu plejparte zorgadis pri la bieno post la morto de sia vidva patrino, saĝe klopodadis konservi bonorde la posedaĵojn, laŭ la plej simpla metodo; sekve tiuj malgravaj kriplajoj kiujn la manko de mono igis neeviteblaj, ŝajnis atestoj de antikva respektindeco, pli ol signoj de venonta ruinigo, kaj la ĝenerala efekto restis ĉarmega.

Ireo ĉiam ŝatis la McHughan bienon, kaj, kiam ŝi alvenis, en ĉiu parto ĝi elmontris la perfektan belecon de Junio. Renkontiĝante, ŝi kaj Franjo estis sufiĉe elverŝemaj kaj Arturo kontentigis ŝian virinan sentemon per saluto, kiu ŝajnis trankvila, malgraŭ la pasia amo, kiu brilis en liaj okuloj. Kompreneble, estis sennombraj demandoj farotaj, kiel kutime fariĝas en tiaj okazoj, kaj kelkaj el ili eĉ estis sufiĉe gravaj por bezoni respondojn; tial la posttagmezo rapide forpasis, kaj Ireo ne trovis oportunan okazon por aludi al la "io plej grava" pri kio petis la letero de ŝia amikino. Sia konjekto, ke Franjo invitis ŝin, kiel fantomvidanton, estis konfirmita de la fakto, ke oni ŝin lokis en la ĉambro, kie la fantomo kutime estis vidita; granda kvadrata ĉambro en la sudorienta flankajo, panelita ĝis la plafono; unu el la plej belaj ĉambroj de la domo. Ĉi tiu ĉambro estis aparte preparita kaj ornamita por iu Majoro Arturo McHugh, praonklo de la nuntempa familio. La majoro honorinde deĵoris sub Lafayette dum la militado de la Amerika Revolucio, kaj li lasis post si bonan reputacion kiel kuraĝa soldato, portreton kiu montris lin belega, kaj la famon, ke li estis amindumulo konata kaj ankaŭ iom diboĉema; kaj li forportis for de la mondo, almenaŭ li ne postlasis, la

sekreton pri la kaŝejo de la fama McHugh diamantaro.

Majoro McHugh estis la plejaĝa filo de sia patro; kaj, dum lia epoko, la familio iom precize obeis la regulon pri unuenaskiteco, pro kio li heredis la bienon. Unufoje amvundite, kaj rifuzite, li ĉiam poste restis fraŭlo, kvankam li estis instigita de sia familio al la edzeco, kaj estis multe tentita de sindonemaj patrinoj, kiuj havis edzingeblajn filinojn. Li testamentis la bienon al samnomita nevo, la plejaĝa filo de sia juna frato, kaj tiu ĉi Arturo McHugh estis avo de la estanta leŭtenanto.

La famaj McHughaj diamantoj en tiu tempo la plej belega juvelaro en Ameriko, akompanis la bienon. La "McHugh stelo", granda, multefacetita gemo, unufoje estis okulo de idolo en la Majaraha Templo, for de kiu ĝin ŝtelis la sakrilegia Rajaho de Zinyt, de kies juvelujo ĝi venis en la manojn de iu Kolonelo McHugh dum la sieĝo de Zinyt en la jaro 1707a. Meze de la deka jarcento oni penis aldoni ĉi tiun belegan diamanton al la kronjuveloj de Francujo, sed la McHugh kiu tiam estis ĉefo de la familio, la patro de Majoro McHugh, emfaze diris, ke li plivole perdos la edzinon kaj la infanojn, ol la "McHughan stelon"; malpia diro, kiu pli bone montris lian ŝatadon de juveloj, ol lian amon al la familio.

Kiam Majoro McHugh forlasis ĉi tiun mondon, en la jaro 1787a, lia heredanto kompreneble serĉis la familian diamantaron, sed li tute ne povis ĝin trovi. Neniu familiano sciis, kie ĝi estis kutime konservita; cirkonstanco kiu ne estas tiel stranga, kiel ĝi ŝajnas, ĉar la majoro neniam estis komunikema, kaj, en tiu tempo, por konservi malgrandajn altvalorajojn, oni plivole fidis la kaŝadon, ol la fortikecon de la moderna monkesto. Oni lastafoje sciis pri la juveloj en la jaro 1785a, kiam bofratino de la majoro surportis ilin ĉe balo. Ili tiam altiris la plej grandajn atenton kaj ad-

miron; sed, kiam oni redonis ilin al la majoro, ili ŝajne malaperis por ĉiam. Kompreneble okazis serĉado, kaj generacio post generacio, aŭdinte la tradician rakonton, kaj fidante al sia lerteco, refaris la klopodon, sed la mistero ĝis nun restis nesolvita.

III

Dum tiu vespera horo, kiu tradicie estas dediĉita por virinaj konfidencioj, kiam la fraŭlinoj kune brosadis siajn hararojn antaŭ ol enlitiĝi, Ireo iom subite demandis:

"Nu, Franjo, kion vi de mi deziras?"

"Deziras?" respondis ŝia amikino, kiu ne povis ne esti evitema, laŭ virina kutimo. "Kompreneble mi deziras vidi vin."

"Jes," ridetante diris la gastino; "kaj tio estas la motivo, kial vi loĝigas min en ĉi tiu ĉambro, kiun mi neniam antaŭe okupis."

La alia ruĝiĝis. "Ĝi estas la plej bela ĉambro en la domo," ŝi senkulpigante sin diris.

"Kaj oni kunloĝas ĉi tie kun la fantomo de la brava majoro," aldonis Ireo.

"Sed oni scias," diris Franjo, "ke fantomoj tute ne ĝenas vin."

"Jam ne tre multe, ĉar mi al kutimiĝis al ili. Ili estas kompatindaj estaĵoj; kaj ŝajnas al mi ke, ju pli oni rifuzas kredi al ili, des pli malfortaj ili fariĝas."

"Ho, vi ne supozas," maltrankvilege kriis Franjo, "ke la fantomo de la majoro jam forvelkis, ĉu vere? De longatempe neniu dormas ĉi tie, kaj tial neniu ĝin vidis dum tre longa tempo."

"Ĉu vi do deziras, ke mi certigu al ĝi, ke laŭ via opinio, posedi familian fantomon estas tre respektinde, kaj ke vi tial esperas, ke ĝi daŭrigos sian okupadon de la ĉambro?"

"Ho, tute ne estas tio," diris Franjo, mallaŭtigante la voĉon. "Mi supozas, ke Arturo furioziĝus, se li sciis pri ĝi, aŭ ke mi eĉ priparolis ĝin; sed mi es-

tas certa, ke estas pli por li ol por mi, ke mi parolas. Ĉu vi ne opinias tion?"

"Vi vere estas tro incitema. Mi neniam eĉ renkontis fantomon, kiu parolis tiel nekomprenoble kiel vi. Kion ajn vi volas diri?"

"Nu, antaŭ kelke da tagoj Arturo ŝerce diris ke, se oni nur povus voligi la majoran—" ŝi rigardis ĉirkaŭen por komprenigi la vorton, kiun ŝi evidente ne volis elparoli en tiu ĉambro, kaj Ireno kapjesis, por montri ke ŝi komprenis—"se oni nur povus voligi ĝin diri, kie estas la diamantoj—"

"Ho, ĉu estas tio?" interrompis Ireno. "Nu, karulino, mi volonte parolos al la majoro, se li permesos; sed kredeble mi ne povos multe fari. Li ne sin ĝenos pri tio, kion mi diros."

"Tamen, petu al li pro lia familia fiereco," respondis Franjo, kun seriozeco, kiu elmontris ke la afero estas por ŝi tre grava. "Diru al li, ke ni ruiniĝas bezonante la helpon, kiun tiuj diamantoj povus provizi. Li devus senti iom da familia fiereco."

Komprenoble Fraŭlino Gaspik ne volis ke ŝia amikino parolu pri la financaj aferoj de la familio, tial ŝi sukcesis ŝanĝi la konversacion, denove promesante ke, se la fantomo de la majoro aperos, ŝi faros sian eblon, akiri de li la sekreton, kiun li konservis dum jarcento. Post nelonge Franjo foriris, kaj Ireno preninte libron eksidis por legi kaj atendi sian vizitonton.

Precize je la noktomezo la fantomo de la majoro aperis. Ĝi estis fantomo de tempo kiam ĉio estis laŭkutima kaj formala, kaj ĝi fidele observis ĉiujn kondiĉojn de tiu tempo. Ireno ĝin atendinte levis siajn okulojn de la libro, kiun ŝi legis, kaj zorgeme ĝin rigardis. La aperaĵo havis mienon de belega viro, iom pli ol mezaĝa, kaj montranta majestatan sintenadon. La figuro estis vestita per antikva milita uniformo, kaj en la mano portis glason, kiu ŝajnis plena de ruĝa vino.

Kiam Ireno levis la okulojn, la fantomo serioze kaj ĝentile riverencis, kaj poste eltrinkis la vinon per unu tiro.

"Bonan vesperon," afable diris Fraŭlino Gaspik. "Ĉu vi bonvolos eksidi?"

Ĉi tiu trankvila saluto evidente surprizis la fantomon, kaj, anstataŭ respondi, ĝi refoje riverencis kaj refoje malplenigis la glason, kiu per ia mistera rimedo jam replenigis.

"Mi dankas vin," diris Ireno, respondante ĝian ripetitan saluton. "Bonvolu vin sidigi. Mi atendis vin, kaj mi havas ion por diri al vi."

La aperaĵo de la mortinta majoro rigardegis ŝin pli mire ol antaŭe.

"Pardonu min?" ĝi respondis per malforta demanda voĉo.

"Eksidu, mi petas," Ireno la trian fojon ĝin invitis.

La fantomo balanciris en antikvan altadorsan seĝon, kiu restis klare videbla tra ĝia figuro, kaj dum momento la paro silente rigardis sin reciproke. Eĉ al la fantomo la situacio ŝajnis iom eksterordinara.

"Ŝajnas al mi," diris Ireno, interrompante la silenton, "ke estus por vi malfacile, rifuzi peton de sinjorino."

"Ho, estus neeble," krietis la fantomo, kun malnovmoda ĝentileco. "Precipe peton de estaĵo tiel ĉarma. Tio estas," ĝi aldonis per iom ŝanĝita tono, kvazaŭ ĝia sperto en la lando de fantomoj montris al ĝi, ke estas necese ĉiam esti zorgeme—"tio estas, ion justan, komprenoble."

Ireno ridetis sian plej allogan rideton, kaj demandis: "Ĉu mi aspektas kvazaŭ mi petus maljustaĵon?"

"Mi estas certa, ke nenio, kion vi petus, povus esti maljusta," respondis la aperaĵo tiel flateme, ke Ireno dum momento konfuzite sentis, ke ŝi perdis sian identecon; ĉar ricevante komplimentojn de fantomo, ŝi nature apenaŭ ne imagis, ke ŝi mem estas nur fantomo.

"Kaj certe la McHughaj diamantoj ne povas nun utili al vi," daŭrigis

Fraŭlino Gaspik, enkondukante sian temon per vere virina nerekteco.

“La McHughaj diamantoj?” balbutante eĥis la fantomo, kvazaŭ la skuo de la surprizo, pro kiu ĝi jam videble fariĝis pli nebuleca, estus preskaŭ tro forta por ĝia senkorpa figuro.

“Jes,” respondis Ireno. “Kompreneble mi mem ne havas rajton pri ili, sed la familio spertas urĝan bezonon, kaj—”

“Ili volas vendi mian diamantaron!” kriegis la aperaĵo kolere levigante. “La malindaj, degenerindaj—”

Vortoj ŝajne mankis al ĝi, kaj ekscitite ĝi rapide englutis du-tri glasojn da vino.

“Sinjoro,” demandis Ireno iom sencele, “kial vi ŝajnas konstante trinki la vinon?”

“Ĉar mi falis senviva,” ĝi malĝoje respondis, “trinkante toston por ŝia Moŝto Sinjorino Betjo Raferti, kaj de tiam mi devas ĉiam trinki vinon, kiam ajn mi ĉeestas kun vivantoj.”

“Sed, ĉu vi ne povas ĉesi?”

“Nur kiam plaĉos al via Moŝto ordoni tion,” ĝi respondis kun sia antikva, formala ĝentileco.

“Kaj la diamantoj,” diris Ireno, tiel subite revenante al tiu temo, ke la fantomo ŝajnis serioze ĝenata, “kiel ajn ili povas utili al vi en via nuna stato?”

“Kiel utili?” sovaĝe ripetis la fantomo. “Ili estas mia okupado. Mi estas ilia fantoma gardanto.”

“Tamen,” ŝi diris, alvokante tiun sian rezonpovon, pri kiu ŝi ĉiam estis fiera, “vi trinkas la ŝajnaĵon de vino, ĉu ne?”

“Kompreneble, Sinjorino,” respondis la fantomo, evidente iom konfuzita.

“Kial do vi ne povas esti kontenta gardante la ŝajnaĵon de la McHughaj diamantoj, lasante la realan, vivantan Arturon McHugh havi la realajn juvelojn?”

“Ho, tio estas malsimila,” respondis la fantomo, kun vere vireca obstineco, “tute malsimila.”

“Kiamaniere ĝi estas malsimila?”

“Mi nun estas gardanto de vera trezoro. Mi estas la plej grava persono el mia tuta rondo.”

“Via rondo?” interrompis Ireno.

“Vi ne povus kompreni,” diris la aperaĵo, “tial, se vi permesos, mi forlasos la klarigon. Se mi redonus la diamantojn, mi fariĝus nur ordinara, drinkema fantomo—io mokinda kaj ridinda.”

“Oni estimegus vin, kiel la postmortan bonfarinton de via familio,” ŝi respondis.

“Mi estas pli kontenta pri la afero, kiel ĝi nun restas. Mi ne tre fidus al la rekompencoj de bonfarintoj. Cetero, la ricevantoj ne apartenus al nia rondo.”

“Vi estas kaj egoisma kaj mokema,” kriis Ireno. Ŝi komencis primediti, kion si plie diros, kaj ŝi dume kontente notis, ke la kandelo brulas blue; cirkonstanco kiu montris al ŝiaj spertaj okuloj, ke la aperaĵo okupas tre respektindan lokon en fantomaj rondoj.

“Suferi la malaprobon de iu tiel ĉarma,” respondis la restaĵo de la antikva ĝentilulo, “estas tiel severa malfeliĉaĵo, ke mi ne povas ne rememorigi al vi, ke vi ne tute komprenas la kondiĉojn en kiuj mi ekzistas.”

Laŭ tiu nekontentiga maniero, dum kelke da tempo, daŭris la konversacio; kaj post kiam la fantomo fine malaperis, kaj Ireno enlitiĝis, ŝi ne povis diri al si, ke ŝi iom sukcesis inklini la fantomon fordoni la sekreton, kiun ĝi tiel longatempe kaj tiel zorgeme gardadis. La amo de la majoro ŝajnis esti encentrigita en la juvelaron, kaj la fiereco, tiu plej forta vira pasio, ŝajnis batali por ĝin defendi.

“Mi timas, ke mi tute ne sukcesos,” Ireno malgaje diris en si; “tamen, malgraŭ ĉio, kiam ĝi vivis, ĝi nur estis viro; kaj ĝi ne povas valori multe pli ol tio nun, kiam ĝi estas fantomo!”

Tre konsolita de la penso, ke io ajn vira povos esti venkita de virina ruzececo, ŝi ekdormis.

(Daŭrigota)

LIBERECO KAJ UNIO

De Daniel Webster

Parolado farita antaŭ la Usona Senato, 26an de Januaro, 1830

Mi pretendas, sinjoro, ke en mia kariero ĝis nun mi firme celadis la prosperon kaj honoron de la lando tuta kaj konservon de nia Federa Unio. Al tiu Unio ni ŝuldas nian sekurecon hejme kaj nian respekton kaj dignon eksterlande. Al tiu Unio ni ĉefe devas danki, kio ajn plej fierigas nin pri nia lando. Tiun Union ni atingis nur per disciplinado de niaj virtoj en la severa lernejo de la malprospero. Ĝi naskiĝis el la bezonoj de malorda financo, mortanta komerco kaj perdita kredito. Sub ĝiaj benaj influoj tiuj ĉi gravaj koncernoj tuj vekigis, kvazaŭ el la tombo, kaj ekfloris per nova vivo. Ĉiu jaro de ĝia ekzisto svarmadis per freŝaj pruvoj pri ĝia utileco kaj ĝiaj bonoj; kaj kvankam nia regiono ĉiam pli ampleksigadis kaj nia loĝantaro disvastiĝadis, ili ne eksterkuris ĝian ŝirmon aŭ ĝiajn profitojn. Ĝi estadis por ni ĉiuj riĉa fonto de nacia, socia, persona feliĉo.

Mi ne permesis al mi, sinjoro, rigardi preter la Union, por vidi, kio eble sin kaŝas en la mallumejoj post ĝi. Mi ne trankvile pesis la ŝancojn, konservi liberecon, kiam niaj kunligiloj estos frakasitaj. Mi ne kutimigis min pendi super la krutegaĵo de l'malunio, por vidi, ĉu, kun mia miopeco, mi povas sondi la abismon sube; kaj mi ne povus taksi kiel fidindan konsilanton ĉe la aferoj de nia regno tiun, kies pripensoj celus antaŭ ĉio, ne kiamaniere la Union plej bone konservi, sed kiel tolerebla estus

la stato de l'popolo, kiam ĝi estus rompita kaj detruita. Dum la Unio daŭras, ni havas altajn, vigligajn, kontentigajn perspektivojn sur nia horizonto, por ni kaj nia idaro. Preter tion mi ne penas penetri la vualon. Dio volu, ke, almenaŭ en mia tago, tiu kurteno ne leviĝos. Dio volu, ke al mia rigardo ne aperos, kio kuŝas malantaŭe.

Kiam miaj okuloj sin turnos, por vidi je la lasta fojo la sunon sur la ĉielo, mi ne trovu lin brilanta super la rompita senhonoraj fragmentoj de iam gloria Unio; super ŝtatoj disigitaj, malakordaj, batalemaj; super lando ŝirita per internaj malpacoj aŭ eĉ dronanta en frata sango! Sed ilia lasta longa, malforta rigardo trafu, prefere, la grandiozan insignon de l'republiko, jam konatan kaj honoratan tra la tuta tero, ankoraŭ tre alte tenatan, kun ĝiaj blazono kaj trofeoj lumantaj per sia praa brilo, unu strio ne forigita nek makulita, unu sola stelo ne estingita—portantan kiel devizon ne mizeran demandaĉon: "Kiom ĉio ĉi valoras?" nek la aliajn vortojn de iluzio kaj malsaĝo; "Libereco unue, Unio poste;" sed ĉie disskribitan en literoj de viva lumo, flamantan sur ĉiuj ĝiaj vastaj faldoj, dum ili flirtas super la maro kaj super la tero, kaj en ĉiu vento sub la tuta ĉielo, tiun alian sentencon, karan por ĉiu vere Usona koro—**Libereco KAJ Unio, nun kaj por ĉiam, unu kaj nedisigeblaj!**

Tradukis Herbert M. Scott.

Dunganto—Nu, kion li diris kiam vi vizitis lin postulante la pagon de lia ŝuldo?

Komizo—Li diris ke li rompos ĉiun oston de mia korpo, kaj ĵetos min tra

la fenestro, se mi remontos mian vizagon tie.

Dunganto—Do tuj reiru, kaj diru al li ke li ne povas timigi min per siaj minacoj.

Trad. Ho Ho

LA DEVENO DE LA VIRINO

En la komenco, kiam Kvaŝtri ekpreparis krei virinon, li trovis ke li konsumis la tuton de siaj materialoj por fari homon, kaj ne restas solidaj elementoj. En tiu ĉi embaraso, post profunda meditado, li agis tiamaniere;—

Li prenis la rondecon de la luno, kaj la kurbecon de la plektokreskaĵoj, kaj la tremecon de la herbo, kaj la graciecon de la fragmito, kaj la florecon de la floroj, kaj la malpezecon de la folioj, kaj konusecon de la rostrego de l'elefanto, kaj la rigardetojn de la cervidoj, kaj la gajan ĝojecon de la sunradioj, kaj la plorecon de la nuboj, kaj la facilecon de la ventoj, kaj la timecon de la leporo, kaj la vanitecon de la pavo, kaj la molecon de la brusto de l'papago, kaj la malmolecon de la diamanto, kaj la kruelecon de la tigro, kaj la varmegan brilecon de la fajro, kaj la malvarmecon de la neĝo, kaj la babilecon de la garoloj, kaj la murmuretojn de la kolomboj, kaj la hipokritecon de la gruo, kaj la fidelecon de la anasviro. Kunmetante ĉiujn ĉi, li faris virinon kaj donis ŝin al la homo.

Sed post semajno la homo venis al li kaj diris:—

“Sinjoro, tiu ĉi kreitaĵo kiun vi donis al mi, igas mian vivon mizera. Si senĉese babiladas, kaj ĉagrenigas min ekstermezure, neniam lasante min sola. Ŝi postulas zorgadon ĉiumomente, tute okupas mian tempon,

ploras pri nenio, kaj estas ĉiam neokupata. Tial mi venis redoni ŝin ĉar mi ne povas kunvivi kun ŝi.”

Tiam Kvaŝtri diris “Bone” kaj akceptis la virinon.

Post alia semajno la homo ree alvenis al li dirante:—

“Sinjoro, mi trovas ke mia vivo estas soleca depost mi fordonis tiun kreitaĵon. Mi memoras kiel ŝi dancaadis, kaj kantadis al mi, kaj rigardis min el la angulo de sia okulo, kaj ludis kun mi, kaj ĉirkaŭprenis min. Sia ridado estis muziko; ŝi estas belega vidi kaj mola tuŝi. Mi petas, redonu ŝin al mi.”

Kaj Kvaŝtri diris “Bone” kaj redonis la virinon al la homo.

Sed post nur tri tagoj la homo reaperis antaŭ la kreinto, al kiu li diris:—“Sinjoro, mi ne scias kiel ĝi estas, sed post ĉio mi konkludis ke ŝi donas al mi pli da maltrankvileco ol plezuro. Tial mi petas ke vi reakceptos ŝin.” Sed Kvaŝtri diris—“For de tie ĉi mi ne havos pli da tiu ĉi. Vi devas mastrumi kiel vi povas.”

Tiam diris la homo:—“Sed mi ne povas kunvivi kun ŝi!” Al kiu Kvaŝtri respondis:—“Vi ankaŭ ne povus vivi sen ŝi.” Kaj li forturnis sin de la homo kaj daŭrigis sian laboron.

Tiam la homo diris:—“Ve! Kion mi faros? Ĉar mi ne povas vivi kun ŝi, nek sen ŝi!”—El la veda literaturo, Angle en Ĵurnalo “Life”.

Tradukis C. M. Wirick.

Johano kaj la Instruistino.

Bubeto, Johano, lernejon iradis,
Kaj, spite avertoj, malpura restadis,
La instruistino tre ofte ordonis
Ke li sin purigu, ŝi vane admonis.
Post longa printempo alvenis somero,

Kaj ankaŭ tro frue varmega vetero.
Pro koto kaj ŝvito la eta Johano
Malbone odoris, necesas la bano.
La instruistino koleras kaj krias
“Vi devas vin lavi, ĉar vere vi scias

Malbona odoro de vi mem eliĝas
Al hejmo! ĝis kiam vi tute puriĝas.”
Morgaŭan matenon Johano revenis,
Kaj en la maneto leteron li tenis.
“Por vi de l' patrino” fiere li diris.
La instruistin' la koverton ekŝiris.
Troviĝis la jena mallonga noteto
“La filo, Johano, ne estas rozeto
Ĉeestas li ne, ke li estu flarata,
Sed por ke li estu de vi instruata.”

—H. W. Fisher.

An Interesting Meeting

On January 10th in Faneuil Hall, Boston, a large mass meeting was held under the auspices of the "Society for the Economic Prevention of Causes for War." A long list of men prominent in the affairs of the day were scheduled to speak on the many different phases of international affairs, particularly the fundamental causes which will lead to a permanent peace. At the invitation of the organizer of the society, Mr. Roger W. Babson, the prize orator of the Association, Mr. Edward Payson, President of the New England Esperanto Association, spoke on "Esperanto and Its Importance in International Relations." Mr. Payson followed a number of speakers who had spoken at length in behalf of a unity of nations, a world federation, an international police, etc. He very aptly seized the opportunity to point out in his usual inimitable manner the uselessness of an endeavor to "get together" and settle matters of interest to forty or fifty different nations, without employing the medium of an international tongue. The citing of numerous personal experiences of real value proved a most interesting part of Mr. Payson's talk. The speaker was warmly applauded, and after the meeting received many inquiries concerning Esperanto.

Li—Jen vi estas, leganta popularan romanon! Mi tute ne komprenas, kiel senmorta estajo povas malŝpari la tempon legante tian senvalorajon.

Si—Ĉu vi estas tute certa, ke mi estas senmorta?

Li—Kompreneble vi estas.

Si—Tiuokaze mi ne komprenas kial mi devus esti tiel ŝparema pri la tempo.

Trad. Ho Ho

The annual meeting of the American Esperantist Co., Inc., was held in the office of the Company, West Newton, on Saturday, Jan. 15th at 3 P.M.

Officers for the current year were elected as follows:

Dr. C. H. Fessenden, President; Ernest F. Dow, Vice-President; I. A. MacCaffrey, Secretary-Treasurer.

The Board of Directors consists of the above officers with J. D. Hailman and W. I. N. Lofland.

The condition of the treasury was discussed and new plans laid for the work during 1916. General and detailed reports of the treasurer were examined and approved. The general statement was ordered published.

STATEMENT

The American Esperantist Co., Inc.

Jan. 1, 1915—Jan. 1, 1916

Income		Expenses
	January	
202.83		216.12
	February	
268.64		250.79
	March	
169.27		167.02
	April	
190.31		173.37
	May	
164.95		160.37
	June	
251.08		259.07
	July	
129.99		127.01
	August	
217.31		204.38
	September	
160.58		165.73
	October	
169.46		176.25
	November	
251.35		247.18
	December	
182.20		209.60
————		————
	\$2357.97	2356.89

PREPAREDNESS!!!

Loaded with a MAY PROPAGANDA NUMBER, you have the sceptic at your mercy.

FAMILIARITY

APPRECIATION

COMPREHENSION

TRUTH

SOLID KNOWLEDGE

concerning the Esperanto Movement will comprise the contents of this issue. Articles relating to every phase of the work.

READ—and strengthen your own faith!

DISTRIBUTE—and convince others!

SPECIAL PRICES ON ADVANCE ORDERS:

FIVE copies—25 cts. TEN for 50 cts. TWENTY-FIVE for \$1.00

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

West Newton, Mass.

FOR 60 c.

(Sm. 1,250) we will send to you,

1 CONGRESS BADGE	\$.35
20 EXPOSITION POSTALS IN ESPERANTO	.15
20 CALIFORNIA POSTALS IN ESPERANTO	.15
1 48 PAGE ESPERANTO GUIDE BOOK OF SAN FRANCISCO AND VICINITY	.05

The above prices are 30% below
actual cost

THE KALIFORNIA ESPERANTISTA RONDARO

946 Central Ave.,
SAN FRANCISCO, CALIF.

Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista

THE WRITER'S MONTHLY

A Monthly Magazine of Interest
to Literary Folks

\$1.00 Yearly

THE WRITER'S MONTHLY

SPRINGFIELD, MASS.

KATALUNA ESPERANTISTO

Monata Oficiala Presorgano de

Kataluna Esperantista Federacio kaj de Baska Esperanta Federacio

Redakcio kaj Administracio—Palla 8, pral., Barcelona (Hispanujo)

Unu el la plej elegantaj gazetoj. Tute verkita per korekta Esperanto. Kun la konstanta kunlaborado de membroj de la Lingva Komitato. La sola aperanta en Hispanujo. Kelke da numeroj ĉiujare kun ilustraĵoj.

INTERESA ENLANDE KAJ EKSTERLANDE

Propagandaj artikoloj. — Belaj literaturajoj.—Bonaj versaĵoj, originalaj aŭ tradukitaj. — Regularo, temoj kaj premioj de la ĉiujaraj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ (Literatura Konkurso).—Recenzoj pri novaj verkoj.—

Sciigoj pri enlanda movado, k.t.p., k.t.p.

JARABONO:—Enlande, 4 pesetoj; Eksterlande, 2'400 spesmiloj

Ciun pluan informon petu de la Administracio, strato Palla, 8, pral., Barcelona

BINDING

Those prized Esperanto volumes need "re-decorating"—Listen to this:

"Just received 'La Faraono' which you had bound for me and am very much pleased with the manner in which the work was done. The three volumes bound together make a rather large book to be sure, but I prefer it to three separate books. My Boirac vortaro which you had bound with the 'aldono' is a constant source of satisfaction. I have never had such good work done at such a low price. I intend to send you my 'Fabiola' soon. It is in very bad condition. . . "

(Name on request)

Books, large and small, Magazines, Volumes of "Amerika Esperantisto" bound in full green cloth, lettered or unlettered, at reasonable rates. Write for details.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

WEST NEWTON, MASS.

ORDER BLANK

The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass.

Please send me at once, the items checked below, for which I enclose the sum of \$.....

Name

Address

.....

Year's subscription to the monthly magazine, AMERIKA ESPERANTISTO, \$1.00	
COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), with vocabularies, \$1.25 postpaid	
Combination of one year's subscription to AMERIKA ESPERANTISTO with copy of COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO, \$2.00	
STUDENTS COMPLETE TEXT BOOK (O'Connor), cloth, 50 cents	
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), 50 cents	

Send me also the following literature as shown in your book-list:

.....

JUST SAY

“Send me a Coupon Ticket”

**The Easy, Practical, Economical Way
to Buy Books**

\$5.50 for \$5.00

The American Esperantist Co., Inc.

West Newton, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

S-ro Emil Lelievre, Bureau des Renseigne-
ments, 37e, Reg. d'Iniant, Troyes, Francujo.

S-ro Sebastian Chaler, S. Mariano 124, Tar-
rasa, Spain. 3

S-ro Armand B. Coigne, 243 Bedford Pk. Bvd.
New York, N. Y., serĉas angle kaj esperan-
te rakontojn de diversspecaj abnormalaj
psikaj spertoj.

S-ro G. B. Corgnali, Udine, Italy, I.P.K., Esp.
kaj Itale. 4

S-ro V. N. Kossizin, Cigirinskaja 3, Blagov-
escensk, Na. Amur, Siberia-Russia. 4

Spain

S-ro Miguel Perich, Libera Stelo, Muntanya,
62 Clot, Barcelona, P.M., gazetojn.

Ĉiuj Amerikaj nomoj kiuj aperas sub ĉi
tiu rubriko aperas ankaŭ senpage en “Kata-
luna Esperantisto” (Barcelona, Hispanujo),
per speciala aranĝado kun tiu administracio.
Tiamaniere ni donas al niaj amikoj bonegan
metodon por akiri plenan liston da kores-
pondantoj, preskaŭ senpage.

S-ro Marian Sota, Placo de Zamenhof, 1 Ter-
rassa, Barcelona, interŝanĝos hispanajn re-
vuojn kontraŭ britaj kaj usonaj.

S-ro Enric Alba, Molas, 19, 1a, Barcelona. x

MONOGRAM EMBOSSE

Handy, compact, distinctive neat ever-
lasting. An ideal gift at any time. One or
two letters, 25 cts. Leahy's, Bx. 264, Alex-
andria, Va.

MIGRATING CARDS !!!

6 FOR 10 cts.

25 FOR 25 cts.

E. H. BECKER

332 Third Ave., Dayton, Ky.

“LA ONDO DE ESPERANTO”

monata ilustrata ĵurnalo, eldonata en Ruslando

1916—VIII-a—jaro

La ĵurnalo aperas akurate la 1-n daton nov-
stila. Ĉiu kajero havas 16-24 paĝojn. For-
mato 17x26 cm. La kunlaboradon partoprenas
ĉiulandaj esperantaj verkistoj. Literaturaj
konkursoj premiataj. Portretaj de konataj Es-
perantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko
originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bib-

La abonpagon—2 rubloj=2,120 sm.=fr.5.35
=mk. 4,32, kr. 5,02, 4 ŝil. 3 p., 2,65 gul., sved.
kr. 3,84, 1.03 dol. (laŭ la poŝta internacia kon-
vencio)—oni sendu al Moskva Librejo “Es-
peranto” (Moskvo, Lubjanskij pr. 3, Rus-
lando) poŝtmandate, papermone, bankĉeke aŭ
pere de enlandaj esperantaj librejoj.


liografio. Amuza fako. Koresponda fako.

Por progresigi la esperantan sciencan lite-
raturon la ĵurnalo senpage donos al la abo-
nantoj en la jaro 1916 1-an parton de granda,
360 paĝa, populare-sciencan verko de Profesoro
de Moskva Universitato K. A. Timirjazjev.

“LA VIVO DE KRESKAJOJ”
Tradukita de Doktoro Andreo Fiŝer

Ĉar dum la milito la poŝtmandata institucio
ne funkcias, la eksterlandanoj tre oportune
povas aboni al la ĵurnalo, sen kurza perdo
kaj multaj poŝtelspezoj, sendante 17 respond-
kuponojn en rekomendita letero.

La anonco en Koresponda fako kostas 30
kop. aŭ 3 respondkuponojn.



The Accompano

A new invention which makes it possible for you to play the kind of music you enjoy. A new method of control which is an integral part of every Emerson Electric Player. You can sit at ease and without conscious effort bring into vivid glowing life your musical conceptions. A singer can completely control the time and modulations, blending the piano tones with his voice, and producing an artistic whole.

Dealers in principal cities and towns.

EMERSON PIANO COMPANY

Established 1849

BOSTON, MASS.